# TESTO 25

## **Ekzerco 1.** Kompletigu la vortspacon.

**1.** Neniu sanktulo estas sen ␣ ␣ **k** ␣ **l** ␣.

**2.** Okuloj estas pli grandaj ol la **v** ␣ **n** ␣ **r** ␣.

**3.** Sub **s** ␣ **r** ␣ **r** ␣ promesojn tenu, sed doninte ne reprenu.

**4.** Felsen staris en profundaj pensoj kaj vekiĝis el sia revado nur tiam, kiam lia amiko lin frapis sur la ␣ ␣ **l** ␣ **r** ␣ ␣ kaj lin premis malsupren sur la sofon.

**5.** Apud la viro sidis lia filo, ses- aŭ sep-jara kun okuloj kiel aveloj kaj kun blua mantelo, kies ␣ ␣ **n** ␣ **k** ␣ ␣ estis ege mallongaj.

**6.** Teatro en Katalunio evitis la plialtigon de aldonvalora imposto (AVI), vendante **k** ␣ **r** ␣ **t** ␣ ␣ ␣ kun enirbiletoj.

**7.** Istar iris fiŝkaptadi kaj lia edzino Larina, kiu restis hejme, subite aŭdis fortan **t** ␣ **n** ␣ **r** ␣ ␣.

**8.** Eduka sukceso alportos materialan sukceson, kaj jam ␣ **v** ␣ **d** ␣ **n** ␣ ␣ ␣ konfliktoj inter tiuj, kiuj havas edukadon kaj tiuj, kiuj ne – ili jam formas kontraŭ-sisteman opozicion.

**9.** La muziko silentiĝis momente, la pordokurteno ekĵetiĝis flanken, kaj sur la sojlo de la pordo sin montris alta, ␣ **r** ␣ **c i** ␣ virina figuro.

**10.** Mia duonpatrino jam de la unuaj tagoj de nia kuna loĝado komencis min malami kaj baldaŭ ␣ **ksc** ␣ **t** ␣ ␣ kontraŭ min mian patron.

## **Ekzerco 2.** Finskribu ĝustan vorton.

**1.** La parlamentanoj prijuĝas kaj aprobas novajn blazonojn kaj **s** ␣ ␣ **nd** ␣ **rd** ␣ ␣ ␣ de civitoj, t.e. urboj kaj vilaĝoj, kiuj ilin ĝis nun ne havis.

**2.** La laboristoj en fabrikoj, kie estas multe da polvo, la **k** ␣ **l** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ en la fumoplenaj restoracioj k.t.p., suferas tre ofte je kronika konjunktivito.

**3.** En kazo de fuĝoj la tuta tajgo estas dividita, kiel ŝaktabulo, je **k** ␣ ␣ **d** ␣ ␣ **t** ␣ ␣, kiuj estas trakribrataj kaj mitrale trapafataj.

**4.** Sian propran **k** ␣ **r** ␣ **k** ␣ ␣ **r** ␣ ␣ la kantoj de tiu ĉi disko tamen ankaŭ kunportas, fojfoje la muziko estas vigla, foje iom trena – laŭ brazila stilo.

**5.** Miĥail Romm montras la teruraĵojn de la faŝisma-nazia ideologio, uzante precipe fragmentojn de dokumentaj **f** ␣ ␣ **m** ␣ ␣ de nazioj mem.

**6.** Nekompareble pli granda danĝero kuŝas nun en la senkontrola kaj sovaĝa tutmondiĝo de la ekonomio, en **fr ␣ n ␣ z ␣** kapitalismo kiu forĵetas ĉian moralan regulon.

**7.** La urbestraro mendis 500 biciklojn por publika, senkosta uzado, sed jam post la unua semajnfino oni **k ␣ n ␣ t ␣ t ␣ ␣**, ke 200 bicikloj estas malaperintaj kaj 100 difektitaj.

**8.** La granda ŝtuparo antaŭ la portalo **a ␣ p ␣ kt ␣ ␣** kiel laŭbo, formita el rozarbetoj kaj grandfoliaj kreskaĵoj.

**9.** La Juĝa Povo de la lando ricevis de la registaro signifan aŭtonomecon por enketi kaj **p ␣ r ␣ ␣ k ␣ t ␣** korupton de ŝtataj oficistoj, kio ĝenis multajn altrangulojn.

**10.** La naskiĝurbo de Arnold Schoenberg, Vieno, havigis al li, okaze de lia 75a naskiĝtago, la **t ␣ t ␣ l ␣ ␣** "Honora urbano".

## **Ekzerco 3.** Kreu el la radikoj ĝustan vorton kaj enskribu ĝin.

laŭd', prezid', mild', rok', krev', task', oranĝ', grad', scen', petol'.

**1.** La publiko estis invitita ĉeesti kaj spekti diversajn filmojn, kies **␣ c ␣ ␣ ␣ r ␣ ␣ ␣** verkis iu el la ĉeestantaj verkistoj, al kiu eblis fari demandojn.

**2.** Oni jam akceptis la olimpikan flamon ĉe Uluru, **␣ ␣ k ␣ g ␣** en la centro de la kontinento kaj sanktejo por aborigena kulturo.

**3.** Ĉie kreskis palmoj, figarboj, **␣ ␣ ␣ ␣ ĝ ␣ j ␣ ␣**, poploj, akacioj, kiuj formis aŭ aleojn, aŭ grupojn de arboj, plantitaj regule kaj preskaŭ de sama alteco.

**4.** Andreo Cseh ordigis la instruitajn gramatikaĵojn en sistema **␣ r ␣ ␣ ␣ g ␣ t ␣** sinsekvo kaj instruis ilin.

**5.** Bedaŭrinde, ankaŭ la **␣ ␣ s ␣ ␣ r ␣** de la konvento estas difinita relative nebule.

**6.** Milito kostas enormajn, apenaŭ imageblajn sumojn, kiuj estus povintaj **␣ ␣ l ␣ ␣ g ␣** suferadon, malsaton en Afriko, Azio, restarigi ekonomiojn kaj doni esperon.

**7.** Kelkaj organizantoj de niaj kongresoj kaj renkontiĝoj havas **␣ ␣ ŭ␣ ␣ ␣ d ␣ ␣** kutimon donaci (ja kontraŭ kotizo) al la partoprenantoj kongres-libreton.

**8.** Mi aŭdis, kiel bruis en la aero, mi ankaŭ aŭdis, kiel tondris, kvazaŭ oni pafus el grandaj kanonoj, la alfluego levis la glacion kaj **␣ ␣ ␣v␣ g ␣ ␣** ĝin.

**9.** Dum liaj lecionoj la **␣ ␣ t ␣ ␣ ␣ m ␣ ␣** knaboj priĵetis unu la alian per ŝmirita pano kunportita por manĝi dum tagmeza paŭzo.

**10.** Pro la kreskanta krizo en la lando (kaj pro ekizoliĝo en la internacia komunumo) necesis elekti novan **␣ ␣ ␣ z ␣ ␣ ␣ ␣ t ␣ ␣**.

**Ekzerco 4.** Marku taŭgan vorton:

**1.** En Usono oni kutimas elpreni monon el ___, mendi rapid-manĝaĵojn aŭ aĉeti kuracilojn, ne elaŭtiĝinte, tio jam estas parto de la ĉiutaga vivo de usonanoj.

**a.** aŭtomato **b.** ringo **c.** vermo **d.** energio

**2.** Kohl estas politikisto ne tre inteligenta, sed havas bonegan ___ por malkovri talentulojn kaj kapablon ligi ilin al si, kaj tiel teni sian potencon.

**a.** pladon **b.** embarason **c.** instinkton **d.** tritikon

**3.** En la ___ de romantikismo munkena pentristo Schraudolph – laŭ ordono de bavara reĝo Ludoviko la 1a – ornamis la katedralon per monumentecaj historiaj freskoj.

**a.** tondro **b.** mantelo **c.** epoko **d.** turo

**4.** La dolĉa plado el ___ estis ornamita per konfitaĵo el ruĝa ribo, konforme al la koloroj de la pola nacia flago.

**a.** valizo **b.** majstro **c.** maniko **d.** kremo

**5.** Feloj servis kiel ___ kaj litkovriloj, el kiuj la ŝipanoj sub la neĝaj kupoloj aranĝis siajn dormolokojn, dum ekstere la neĝo kraketadis kaj regis frosto.

**a.** matracoj **b.** zonoj **c.** energioj **d.** makuloj

**6.** Okazas simple, ke la aŭtoro ne estas ronda stilisto; mankas iom da eleganto al liaj ___ kaj prozo, kvankam ĉi tiu montriĝas certe pli flua kaj natura ol liaj poemtradukoj.

**a.** datoj **b.** ventroj **c.** kvadrato **d.** versoj

**7.** Verduloj diras, ke pli ol duono de la civitanoj deziras, ke genetike modifitaj manĝaĵoj ___ estu malpermesataj.

**a.** nude **b.** daŭre **c.** pale **d.** tapiŝe

**8.** Longaj vicoj formiĝis ekster la balotejoj en la ĉefurbo Katmanduo; multaj entuziasmaj balotontoj ___ sin per ombreloj de la bruliga suno.

**a.** kudris **b.** supozis **c.** ŝvitis **d.** ŝirmis

**9.** La hoteloj ___ grandegajn rabatojn, ĉar pro la proceso kontraŭ Abdulaho Öcalan preskaŭ neniu estis veninta dum aprilo kaj majo.

**a.** ofertis **b.** dronis **c.** grimpis **d.** rajdis

**10.** Oni afable aplaŭdis tri liajn kantojn plenajn de amo al Esperantujo, sed ___ la melodiojn kaj temojn iom eksmodaj.

**a.** enuis **b.** luis **c.** taksis **d.** muelis